



MARTO 2017



N° 150

La «*Esperanto-Gironde*» Informilo

JUBILEA NUMERO



150a LEGI!

Bonvolu permesi al mi...

Nia loka esperanto-asocio kreiĝis antaŭ pli ol kvindek jaroj. Antaŭ pli ol tridek jaroj ĝi transprenis la nomon Esperanto-Gironde kaj pli malpli samtempe ĝia interna ligilo aperis sub formo de bulteneto kun titolo «La Esperanto-Gironde Informilo» aŭ pli koncize «LEGI». Mi klare memoras la kunvenon en nia cenona sidejo, kiam ni elektis tiun nomon. Kvankam pluraj kamaradoj antaŭe proponis diversajn titolojn, unuanime ĉiuj ĉeestantoj tuj elektis tiun ĉi. Kiel tiama sekretario, mi fariĝis la enpaĝiganto de la unuaj numeroj. Tial vi bonvolu hodiaŭ permesi al mi...

Bonvolu permesi al mi honori kaj danki ĉiujn kamaradojn, kiuj kontribuis kunredakti tiun neregule aperantan, tamen tiel gravan organon por nia agado. Ja multaj, la plimulto eĉ, el tiuj aktivuloj forpasis, aŭ forsvenis en la tro rapida moderna vivo. Tiujn ĉi ni respekteme salutu kaj memoru kiel eminentajn rolulojn por la vivo de la internacia lingvo en Ĝirondio. Mi citos neniun nomon, ĉar mi tro timus forgesi nur unu. LEGI ĝuste kiel arkivaĵoj ebligas longdaŭran spuron, kiu postsekvos la homan fizikan ĉeeston. Ne hezitu foliumi la kompletan LEGI-kolekton, kiu atendas legontojn en nia sideja ŝranko. LEGI vive rakontos al vi la historion de nia grupo. Tiu bulteno vere spegulas ĝin. En ĝi vi (re)trovos raportojn pri gravaj eventoj okazintaj, organizitaj de niaj membroj en Ĝirondio: internaciaj kongresoj de SAT kaj SAT-Amikaro, de IKBE (blindaj esperantistoj), IFEF (fervojistoj), junularaj renkontiĝoj, landa (UFE), regionaj staĝoj, kunvenoj, kursoj, vojaĝoj, akceptoj de eksterlandaj vizitantoj... kaj kompreneble vi ankaŭ legos pri *La Kompanoj* kaj ties multifacetaj spektakloj!

Bonvolu permesi al mi sendi apartan mencion al tiuj, kiuj transprenis la esencan rolon pluvivteni la eldonadon de LEGI. Ĝi ja ne tiel facilas. Kaj tamen jen la 150a numero! Kaj kiel luksa!

Bonvolu permesi al mi simple kaj modeste fieri pro tio! Pro tiu sukceso! Ek al plua serio da 150 kromaj numeroj!

Marcelo




LEGI tra ĝia historio



ESPERANTO-KURSOJ EN UNIVERSITATO

La kursoj pri Esperanto komenciĝis en Universitato Bordeaux Montaigne, far Elvezio.

Sekvu la ligilon : <http://etu.u-bordeaux-montaigne.fr/fr/news/formations/initiation-a-l-esperanto.html>



OMAĜE AL ŜELIN'

Ŝelin', valorplena kasistino

Piliero de nia asocio, altstatura, eleganta, delikata Ŝelin' estis jam kasistino de la tiama «Groupe des Travailleurs Espérantistes Girondins», kiam mi revenis el Germanio en 1986. Ŝi mem ne plu memoris, kiam ŝi komencis tiun funkcion. Fidela kompetenta kasistino, kiu daŭre instigis nin al elspezo, ĉar laŭ ŝi, tiel montriĝis niaj aktivadoj. Kaj fakte ŝi devis konstati, ke ŝia rigora laboro plene efikis, ĉar jaron post jaro ŝiaj financaj bilancoj ĉiam spegulis saĝan, flege kontrolitan kontadon. Ne timigis la gigantaj kromlaboroj ŝuldataj al la kongresorganizadoj. Ŝelin' digne kaj efike partoprenis en la decidoj de la grupo.

Ŝelin' apartenis al tiu skolo de esperantistoj, Freinet-pedagogoj, kiuj plene vivis siajn konvinkojn, kadre de nia grupo, kiel en sia klasĉambro kun siaj lernantoj. Kaj same en sia familio.

Vi komprenu, ke malfacilas skribi pri Ŝelin' sen aludi pri ŝia edzo Milu'. Ne disigebla paro. Li modeste nomis sin *ŝoforo kaj portanto de la valizoj de la kasistino!* Ja valizoj kaj skatoloj ne mankis, plenaj je libroj, broŝuroj, diskoj, informiloj, propagandiloj, steletoj, insignoj, glumarkoj, ktp. Pluraj tabloj kovritaj dum niaj staĝoj atestis niajn riĉaĵojn, Ŝelin' kaj Milu' zorge instalis, deĵoradis ĉe la budo, reordigis, repakis por la venonta fojo.



Ŝelin' kun Milu', okaze de ŝia datreveno la 5an de januaro 1999

Sian esperantan aktivadon ili dediĉis al SAT kaj SAT-Amikaro, partoprenante en multaj kongresoj, sed kompreneble ankaŭ al GEE (Grupo de Esperantistaj Edukistoj), subtenante la projektojn de la *Kultur-Domo Grésillon* kaj *ICEM-Esperanto*.

Ili loĝis en altega dombloko de la bordoza norda kvatalo «Granda Parko», ĝuste kie mankis... arboj! Sed proksima al naturo la familio Demontoux estis naturista, kaj ĉiusomere pasigis feritagojn en naturista kampadejo apud Montalivet. Ili facile argumentis tiun vivelekton, kiel la plej egalecan. Kaj for de ĉiu komplekso trudita de religia aŭ laŭdire bonmora opinio la psi-ko kiel la korpo povis ĝui senperan liberon.

En ilia apartamento, ĉiuj ĉambroj plenplenis de libroj kaj diskoj. Kia granda kulturo! Klasika, folkloro, loka, ĉiea... Kiel junulo, timeme mi eniris en tiun lokon, kvankam mi sciis, kiel gastemaj estis Ŝelin' kaj Milu'. Ilia adreso longe aperis en la Pasporta Servo kaj ili volonte akceptis grupkunvenojn en sia somerdomo en St-Symphorien.

Kompreneble mi ne povas raporti pri ĉiuj eventoj, kiujn ni komune travivis. Tamen kelkaj el ili frapis mian junaĝon. Inter tiuj, mi memoras, ke la unua funebroceremonio en kiu mi iam ajn partoprenis, okazis en la preĝejo de ilia kvartalo. Ni tiam funebriis Henriette Chaillot, tiama plejaĝa grupanino. Mi memoras, ke post la ceremonio, Ŝelin' trafe taksis mian bezonon je komforto kaj invitis min trinki ion ĉe si. Unuan fojon mi malkovris la kulturkavernan apartamenton.

Memorinda ankaŭ la spektaklo, kiun la grupanoj prezentis al Ŝelin' por festi ŝian okdek-jariĝon. En januaro 1999 ĵus post la enveno de eŭro en niajn monuojn. Tiam ĉiuj daŭre bezonis ŝanĝi de eŭroj al frankoj kaj inverse por provi ne tro perdiĝi en siaj kontoj. Tial Esperanto-Gironde ne hezitis festi «sian kasistinon kaj ŝian ĉiutagan helpanton!» per skeĉspektaklo titolita «Ŝelin' estas 12,20 eŭrojara!». Enkonduke al tiu vespero ni ĉiuj kunkantis la ĉi apudan adapton de fama kanzono.

*Esperanto-Gironde est en fête
On oublie les comptes un instant
Car c'est aujourd'hui que l'on fête
Cheline et ses quatr' fois vingt ans.
A notre très chère trésorière
Qui pleur' parc' qu'elle a trop de sous,
Amis, réunis pour le coup,
Chantons tous en levant nos verres...
On n'a pas tous les jours vingt ans,
Ça nous arrive une fois seulement,
Mêm' quatr' fois pass'nt encor trop vite,
C'est pourquoi faut qu'on en profite.
Si demain la caisse est vidée,
On organis'ra un congrès...
Un', deux, trois ou quatr' fois dans l' vent,
On n'a pas tous les jours vingt ans !*
Artigues 23/01/1999

Efika sed diskreta, Ŝelin' ne ofte aperas sur fotoj, kiuj ilustras niajn eventojn. En ombro ŝi preferis labori kaj vole lasis la lumon kaj aplaŭdojn al aliaj. Nelaŭte, trafe! Inter la personaj sukcesoj de Ŝelin' ni ankaŭ menciuj la komplikecon, kiun ŝi plektis kun Monique, sia posteulino.



Ĉe Monique, kun Louissette, en 2007

Ŝelin' forte suferis pro la forpaso de Milu' sed ankaŭ de Claudine, ŝia unua filino. Ambaŭ pro kancero. Preskaŭ centjara Ŝelin' siavice forlasis la vivon. Pluraj fidelaj kamaradoj laste akompanis ŝin en la kremaciejo.

Dankon Ŝelin' pro la multaj realigaĵoj, kiujn ni sukcesis dank'al cia longdaŭra engaĝiĝo, dank'al ci, ĉe la ŝlosila kaspusteno de nia asocio.

Humile, korpemite,

Marcelo



Ŝelin' en 2003, je la datreveno de Simonne

Kiam mi prenis la postenon de kasistino de Espéranto Gironde, laŭ cia peto, ci restis apud mi dum ankoraŭ kelkaj jaroj kaj, de tiam, ci fariĝis fidela amikino.

Mi ofte vizitis cin en cia apartamento, ĉu por tagmanĝi, ĉu por teumi. Ni ludis skrablon, en esperanto kompreneble, kaj parolis pri libroj, kiuj abundis en cia biblioteko.

Ni ankaŭ renkontis nin por labori ĉirkaŭ manĝeto, ĉu en Carbon Blanc kun Henriko, Marcelle kaj Simonne, ĉu en St André de Cubzac ĉe Louise kun Germaine.

Ni agrable kune vojaĝis, en 1992 por la Internacia Semajno de Esperanto, en Sète, kun Denise; revenante de kongreso en Quintin, en 1998, kun Milou kaj Louise; poste en La Roche-sur-Yon en 2004 kun Louise kaj Léo.

La jaroj forflugas tro rapide kaj miaj lastaj vizitoj en maljunulejo, kie ci velkis, iĝis pli kaj pli malfacilaj.

Ĉiuj momentoj de mia vivo, kiel ĉiuj kiujn mi travivis dank'al nia movado, de tempo al tempo revenas al mia memoro kun granda plezuro kaj emocio, kaj ci aperas meze de aliaj amikoj, kiel kvietiga, amema persono.

Adiaŭ Ŝelin'.

Monique



Ĉe Louise, en 2009, Ŝelin' kun Germaine kaj Monique

Micheline Demontoux, alidire Ŝelin’.

Mi konatiĝis kun Ŝelin’ en la jaro 76, kiam mi aniĝis al la esperantista grupo de Cenon, kiu en tiu tempo nomiĝis: «Groupe des Travailleurs Espérantistes Girondins».

Ŝi estis juna emeritino (profesie ŝi estis instruistino en elementa lernejo) kaj eklernis Esperanton, same kiel mi. Ni kune trapasis la unuagradan ekzamenon en Langon, ĉe nia amiko Henri Dufour en 77... sukcese!

Kiam Renato Damarin ne plu povis zorgi pri la financoj de la asocio, Ŝelin konsentis transpreni la taskon, helpe de Milu’, ŝia edzo, kiu ofte transportis pezajn kestojn da vendotaj libroj, ĉefe kiam okazis en la jaroj 90 la semajnfinaj staĝoj en Artigues. Dum 20 jaroj proksimume, Ŝelin’, serioze kaj rigore, rolis kiel nia kasistino, kaj poste ŝi transdonis la taskon al Monique.

Krom Esperanto, Milu kaj Ŝelin apartenis al alia progresema movado. Ekde la jaroj 50, ili estis naturistoj kaj verŝajne agadis kun la pioniroj, kiuj stariĝis la naturistan centron en Montalivet. Tie ili havis dometon kaj ĉiusomere ili feriiis sub la pinarboj, kun siaj tri filinoj.

Por ili, en tiu tempo, naturismo ne estis modo sed engaĝiĝo por pli simpla kaj pli sana vivo en la naturo.

Espéranto-Gironde festis ŝian 90an datrevenon en Libourne, en 2007. Ŝiaj filinoj ĉeestis. Estis bela tago por ŝi kaj por ni ĉiuj.


Ŝelin’ estis afabla kaj modesta amikino, prizorgema por la aliaj. Ĉiam estis plezuro revidi ŝin okaze de kunvenoj.



Joël

Ŝelin’ en 2003, je la datreveno de Simonne

ESPERANTO GIRONDE
REĜFESTO
8an de JANUARO 2017
en CENON

 **Ĉeestas:** Elvezio Canonica, Janine kaj Yannick Dumoulin, Martine Edelbloude, Bruno Ferré, Marie-Thérèse Guillaume, Christiane kaj Michel Jagueneau, Peio Labbé, Aurora Lopez Rodriguez (ekde la 12a horo), Claudine Pomiról, Marcelo Redoulez, Bernard kaj Rose Sarlandie, Herminia Sevilla, Morine Stride, Bernard Vidal.

Senkulpiĝis: Monique Dussenty, JeanSeb.

Elvezio deziras al ĉiuj feliĉan jaron 2017. Li bonvenigas Herminia-n Sevilla, filino de Pedro kaj prezidantino de Esperanto-Gujan-Mestras. Li dankas la sekretariinon, Janine, pro la lasta numero de LEGI.

Li donas novaĵojn pri JeanSeb, kiu pli bone fartas, sed ne povis veni, ĉar li festas la mielmonaton post edziĝo antaŭ kelkaj tagoj en Pessac: Elvezio estis atestanto.

Pri la problemoj kun la prefektejo: nun ĉio estas en ordo, la ŝanĝoj pri la estraro kaj la adreso estas registritaj; la ricevateston ricevis Elvezio.

Li alvokis s-inon Gisèle Gizard pri la estigo de nova regiona Eo-asocio, sed neniu respondis. Li denove provos pli poste.

La kursoj en la universitato ne komenciĝis. Ili tre verŝajne okazos dum la 2a sesmonato. Estas malfacile trovi taŭgan horon kaj salonon. Elvezio organizis inform-kunvenon en la universitato; el dekkvino da ĉeestantoj kvar studentoj sin montris interesataj. Ne certas, ke ili partoprenos en la kurso, sed du studentinoj de la jaro pasinta daŭrigos.

Pri la turneo de Duncan Charters: Elvezio proponis la 15an de marto (merkredon) je la 17a30. Aurora pretas lin gastigi. Ĝis nun, Yves Nicolas ne sendis la tutan kalendaron de la turneo. Ni devos akordiĝi pri la temo de la prelego, inter tiuj proponitaj de Duncan Charters.

Yannick jam renkontis lin en diversaj kongresoj. Li estas profesoro pri hispana literaturo en Universitato en Ilinojso (Usono).

Temoj proponitaj:

1/ Kial prezidento Donald Trump? 2/ Loĝi ĉe la Granda Rivero (Misisipo)
3/ Religio en Usono 4/ Kiel poliglotoj lernas lingvojn? 5/ Kial legi literaturon?
6/ Interkultura kompreniĝo 7/ La hispana literaturo 8/ Kiel komuniki publike?
9/ Eritreo kaj la rolo de lingvoj en militoj.
Tujan tradukon faros JeanSeb kaj Elvezio.

Pri la retpaĝaro: **Yannick**: Nenio evoluis.

Pri la libro-traduko (*Sciences à l'école...*): Monique zorgas pri ĝi; ni havas neniun plian novaĵon.

Pri la montaraj floroj: la projekto evoluas.

Marcelo montros la bildojn, ludojn ktp.

Li cetere havas novan proponon pri io alia: por sia 30jariĝa jubileo en 2017, Kajto rekvaropiĝis. Ili proponas veni en Francion dum la somero, okaze de vojaĝo al Hispanio (Teruel) fine de junio. Ili povos kanti en Francio fine de junio aŭ komence de julio, aŭ eĉ fine de aŭgusto. Pro la specialaj ligoj inter ili kaj Espéranto-Gironde ili pretus koncerti ĉe ni senpage (krom gastigo kaj repago de vojaĝkostoj). Espéranto-Gironde ne maltrafu tiun okazon. Marcelo jam parolis pri tio en urbo-kunveno en Cambes. La reagoj de la urbestro estis favoraj. Oni unue esploru en Cenon. Jam estas malfrue por la spektaklo-salonoj (la programo estas jam kompleta), sed koncerto en salono aŭ ekstere povus okazi en Palmer (ne en aŭgusto). Estus pli da laboro por ni; se la urbo konsentus zorgi pri ĝi, la laboro estus pli facila.



Yannick kaj Janine pensas pri la nokta stratbazaro, ĉiun someran mardon, en Montendre. Ili informiĝu pri la eblecoj enŝovi koncerton en la programon, aŭ inter la spektaklojn ĉe la ekstera teatro de la kastelo.

Morine: Ĉiun someran sabaton okazas vesperaj spektakloj kadre de «La piste sous les étoiles» en Créon.

Bernard V.: Dumsomere okazas vesperaj spektakloj ĉiun ĵaudon en Gujan Mestras.

Claudine: Ĉiu esploru siaflanke.

Marcelo prezentas la ĵus akiritan novan projekciilon. Problemo: la vendisto vendis kablون, kiu ne konvenas. La kablo estas ŝanĝenda. La projekciilo estis vendita kun interesa rabato, je 480€. Estis samokaze aĉetitaj laŭtparoliloj. La antaŭa projekciilo malaperis el ŝlosita ŝranko de Palmer (same kiel aliaj aparatoj de aliaj asocioj...). Do tiu ĉi ne restos en Cenon sed zorgos pri ĝi Marcelo kaj Claudine; ĝi kompreneble estos je la dispono de kiu ajn ĝin bezonos.

Alia propono por La Kompanoj: kunkantada renkontiĝo en Parthenay kaj la ĉirkaŭaĵoj, organizata de Esperanto 79, okaze de la ĉielira semajnfino. Marcelo transsendos la informon al tiuj, kiuj ne ricevis ĝin.

Cetere, ĉar nia unua celo estas praktiki Esperanton, Marcelo proponas, ke ni jam fiksi datojn por venontaj renkontiĝoj (tuttagaj aŭ duontagaj), kiuj donos al ni ĉiuj la okazon praktiki.

Datoj de la venontaj renkontiĝoj :

- 12an de februaro: tuttaga « Krespo-tago »; verŝajne en Cenon (konfirmote de Marcelo)
- 15an de marto, okaze de la prelego de Duncan Charters; ni povus kune vespermanĝi post la prelego
- 21an de majo, tuttaga renkontiĝo en Gujan-Mestras

La manĝo estis, kiel kutime, abunda, kun reĝkukoj donacitaj de Espéranto-Gironde... kaj aliaj! Unu reĝo sin anoncis: Peio.



Post la manĝo, **Bernard V.** prezentis propran rakonton pri la korvo kaj la vulpo, kun multaj amuzaj detaloj!

Poste oni instalas la materialon por la projekciado pri la montaraj floroj, kio estis iom malfacila pro la netaŭga kablo... Ni sukcesis parte elturniĝi sed tamen ne povis aŭdi ĉiujn kanzonojn, kiujn ni intencis... kaj ni eĉ spertis plurminutan elektro-paneon!...



La lumbildaron «*Kiam naturo helpas praktiki Esperanton kaj reciproke*» konstruas Marcelo, el la libro *450 fleurs - Les indispensables* – Delachaux, kiu prezentas tre precizajn slipojn pri floroj (interalie montaraj).

Malgraŭ la diversaj malfacilaĵoj, ni povis pasigi plej agrablan tempon, kaj ni eksciis multajn aferojn pri kelkaj montaraj floroj, iliaj koloroj, alteco, karakterizaĵoj kaj medicinaj uzoj ktp. Ni povis aŭdi *Ĝi kantas (Se canto)* far Patric, fama okcitana kantisto, kaj kunkanti. Ni pli precize konatiĝis kun la martagono, la gencianoj, la karlino ktp.

La kunveno finiĝis je la 16a45.

Janine

NIAJ KURSOJ

- A **GUJAN-MESTRAS**, le jeudi de 15h à 17h, cours pour débutants, au local attenant au bureau de poste de la Hume, 43 avenue du Maréchal de Lattre de Tassigny 33470 Gujan-Mestras. (06 95 02 85 00)
- A **CREON**, le jeudi tous les 15 jours de 14h à 16h, cours pour débutants chez Morine STRIDE, 17 rue Voltaire. (06 10 07 08 58)
- En **GALGON**, ĉiun mardon de la 17a ĝis la 19a, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj. (05 57 69 26 96)
- En **CENON** (Kastelo Palmer), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ animas tradukgrupon kaj Claudine POMIROL kurson por komencantoj. (05 56 21 38 64)
- En **MONTENDRE**, ĉiun mardon de la 10a ĝis la 12a, Janine Dumoulin gvidas kurson por ĉiuj niveloj. (05 46 49 45 18)
- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono MOD 005, ĉiun merkredon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio kaj JeanSeb. (06 72 17 22 97)

ESPERANTO GIRONDE

KUNVENO EN CREON LA 12an de FEBRUARO 2017

Ceeŝtis: Elvezio Canonica, Thérèse Cayatte, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Marie-Thérèse Guillaume, Peio Labbé, Joël Lajus, Aurora Lopez-Rodriguez, Claudine Pomiro, Marcelo Redoulez, Morine Stride.

Senkulpigitaj: JeanSeb Brilleaud, Monique Dussenty, Christiane Jagueneau, Michel Jagueneau, Bernard Sarlandie, Rose Sarlandie

Elvezio dankas al Morine kaj Peio pro ilia gastigo.

- Por LEGI nro150, Joël sendos artikolon.

- Pri la turneo de Duncan Charters: finfine la turneo ne okazos en sud-okcidenta parto de Francio.

- La kurso komenciĝis en la universitato: deko da gelernantoj ĉeestis, el pluraj lernoĵaroj.

- Zamenhofa jaro: Ĉu ni faru ion? Ni povas ekzemple organizi prelegon en la Universitato (la universitataj kursoj finiĝos fine de aprilo).

- Venontaj kunvenoj: • por anstataŭigi tiun planitan por la veno de Duncan Charters, estas proponita **la 2a de aprilo**. Marcelo kontrolos, ĉu Cendon estas libera.

• la **21an de majo** en Gujan Mestras

- Pri la traduko de *La Science à l'école*: nenio nova.

Marcelo prezentas alian aferon: demando de Fabrice pri la uzo de la nomo de La Kompanoj.

1/ Animation à l'université

Morine propose de remplacer la conférence de Duncan Charters par une autre animation à l'université. Peut-être à partir du conte des « chaudoudoux ». On pourrait mettre l'histoire en scène avec des masques, par exemple.

Marie-Thérèse : Lors de la présentation à l'université on a parlé d'internet et des associations de jeunes espérantistes : il est important de montrer que l'espéranto n'est pas seulement « une affaire de vieux ».

Morine : La présentation peut être faite fin avril ou en octobre.

Janine : Il faudrait retravailler la traduction espéranto, en particulier à partir de l'original (celle existant a été faite à partir de la version française).

Marcelo : On peut travailler sur la traduction le lundi.

Yannick et Janine collaboreront à partir de l'original en anglais.

Elvezio : On peut envisager une petite conférence sur Zamenhof avant la fin des cours à l'université.

Janine a un document tout prêt sur la biographie de Zamenhof, à partir du livre de Masson et Centassi, à envoyer à Elvezio.

Elvezio : La salle est un Algeco, pas très agréable mais chauffée. On pourrait envisager la conférence le **mercredi 12 avril à 17h30**. On pourrait aussi présenter des chansons, les activités d'Espéranto-Gironde...

Janine : ... et aussi éventuellement des extraits choisis du spectacle de Lille.

Joël : ... mais aussi du film *Espéranto*.

2/ Droit d'utilisation du nom des Kompanoj

Marcelo revient sur la question de Fabrice et explique le contexte : Fabrice, Pierre Bouvier et Bernard Legeay vont enregistrer un disque de Brel en espéranto : sous quel nom mettre le disque ? Peut-on utiliser le nom La Kompanoj ? La décision revient à Espéranto-Gironde.

Les premiers spectacles d'Espéranto-Gironde remontent à 1989. La première réalisation sous le nom de La Kompanoj est le spectacle sur Brassens au Congrès de SAT-Amikaro à Amboise en 1990 (le nom La Kompanoj vient d'ailleurs de la chanson *Les Copains d'abord*).



Aujourd'hui la production du disque fait suite au travail des Kompanoj à Lille, mais tous ne sont pas membres d'Espéranto-Gironde. La question est donc de savoir si Espéranto-Gironde autorise l'édition d'un nouveau disque des Kompanoj... même si aucun des participants à la production du disque n'est membre d'Espéranto-Gironde.

Claudine : Les Kompanoj sont un groupe constitué des gens de partout, de nombre variable.

Marcelo : Oui, mais le nom officiel des Kompanoj est « kanta kaj teatra trupo de Espéranto-Gironde », pour les assurances, par exemple, et d'un point de vue administratif en général.

Morine : Pour le CD, la question s'était posée. Finalement ce n'est pas le nom des Kompanoj qui avait été retenu et on avait composé le nom Mor/za, mais Espéranto-Gironde avait bien participé à sa production. On pourra en discuter lors de la rencontre de Parthenay, à l'Ascension.

Marcelo ne pourra pas être présent à Parthenay.

Yannick : La qualité du disque sur Brel ne pourra pas nuire à notre réputation.

Claudine : L'enregistrement doit se faire dans la Drôme ou à Toulouse.

Peio : Ce serait bien si nous pouvions participer aux chœurs.

Marcelo : Flo (Vinilkosmo) est ravi du projet ; il connaît bien le niveau du spectacle. Il pense que ce sera super si on peut garder le nom des Kompanoj, qui est connu maintenant, grâce au spectacle de Lille.

Joël : Si on enregistre sous le nom des Kompanoj, est-ce qu'Espéranto-Gironde sera financièrement impliqué ?

Marcelo : Non, ce sont les producteurs qui paieront les droits à la SACEM (Flo participe pour moitié à la production). Il est prévu une production de 1000 CD (ce qui est très important en espéranto). Jacques Yvart l'avait fait avec Brassens, et les CD se sont vendus très vite. Mais aujourd'hui les ventes de CD sont en chute libre, en particulier en espéranto : la dernière production de Flo, Jomo, devait recevoir 100 souscriptions pour une production de 300 CD, et à l'échéance les 100 commandes n'étaient pas arrivées.

Morine : Pour Mor/za, on en avait produit 500 et on en a vendu environ 300, pas seulement parmi les espérantistes. Les ventes se font surtout après les concerts.

Claudine : Espéranto-Gironde peut-il envisager de soutenir le projet ? Comment ?

Yannick : S'il y a appel à un financement participatif, Espéranto-Gironde peut participer.

Marcelo : Il est évident qu'un tel projet génère des frais (production, SACEM...). Patrick et Françoise (Duobla Unu) sont partie prenante du projet (studio d'enregistrement). Si Espéranto-Gironde propose d'aider financièrement, que ce soit sous forme d'aide au projet ou sous forme de financement participatif, ils seront ravis.

Claudine : Mais pour le moment ils n'ont rien demandé.

Morine : On pourra en parler à Parthenay.

Marcelo : Le titre pourrait être : *La Kompanoj kantas Brel en Esperanto*.

Elvezio : Il serait bon qu'il y ait le logo d'Espéranto-Gironde sur le CD (en tant que participant à la production).

Joël : Il serait intéressant que le groupe se produise en Gironde.

Marcelo : Il faudra qu'ils s'organisent une tournée.

En ce qui concerne le projet de cet été avec Kajto : UEA n'a pas encore fermement décidé du programme artistique de Séoul. Donc ils ne peuvent pas donner de date pour l'Espagne et la France.

3/ Questions diverses

Marcelo : Véronique Girard (libroservo de SAT-Amikaro) a envoyé un manuscrit de Marc Bertrand, professeur émérite des Universités, spécialiste de Marceline Desbordes-Valmore ; il propose une traduction en espéranto, qu'il a appris il y a quatre-vingts ans, du poème *Les Roses de Saâdi*.

Nous louons tous la qualité de la traduction. Marcelo se propose de corriger les quelques petites erreurs qui s'y trouvent.

4/ Animations

- A la fin du repas, **Marcelo et Claudine** proposent un jeu de questions/réponses en espéranto sur le thème de la Chandeleur, grâce à des pailles dissimulées dans certaines des crêpes qu'ils ont apportées : chaque paille donne le droit de tirer au sort une question à poser à l'ensemble de la table, ou une anecdote à lire. Ensuite c'est un jeu de rimes en espéranto. Ils offrent à Elvezio un exemplaire de la *Dia Komedio*.

- Post la manĝo, **Aurora** prezentas libron: *Patria*, de Fernando Aramburu, kiun ŝi antaŭ nelonge legis. Temas pri eŭska regiono. La romano rakontas la vivon de du familioj en societo kaj epoko afliktita de perarma lukto (terorismo kaj kontraŭterorismo). Ĝi parolas pri homoj, kiuj daŭre vivas. Ilia vivo estas renversita pro ETA. La centra temo estas pardono por la estonteca paco en Eŭskio. ETA kapitulacis en 2001 sen peti pardonon. Nune, en Hispanio, estas granda debato pri pardono.



La prezento estigas tre interesan kaj viglan diskuton inter ni.

Tiel finiĝas tiu renkontiĝo.

Janine

Les roses de Saâdi

J'ai voulu ce matin te rapporter des roses ;
Mais j'en avais tant pris dans mes ceintures closes
Que les nœuds trop serrés n'ont pu les contenir.

Les nœuds ont éclaté. Les roses envolées
Dans le vent, à la mer s'en sont toutes allées.
Elles ont suivi l'eau pour ne plus revenir ;

La vague en a paru rouge et comme enflammée.
Ce soir, ma robe encore en est tout embaumée...
Respires-en sur moi l'odorant souvenir.

Marceline DESBORDES-VALMORE (1786-1859)



La rozoj de Sadio

*Hodiaŭ matene al vi mi volis porti rozojn.
Sed tiom mi metis en miajn fermitajn zonojn
Ke la nodoj tro streĉaj ne povis teni ilin.*

*La nodoj disrompiĝis, la rozoj elflugintaj
En la vento al la maro, ĉiuj foren deiris.
Ili sekvis la akvon, revenonte neniam.*


*La ondo ŝajnis ruĝa kaj kvazaŭ flamigita.
Ĉi vespere mia robo plu restas balzamita...
Ilia odoran lasaĵon vi spiru sur mi.*

Marc Bertrand kaj Marcelo



Giovanni PETERLONGO (1856-1941) la unua tradukisto en Esperanto de la tuta *Dia komedio* de Dante Alighieri (1265-1321)

Lia vivo



Giovanni Peterlongo naskiĝis en Trento en 1856 kaj tie finis gimnazian lernadon. Ni memoru ke en tiu epoko Trento ankoraŭ apartenis al la aŭstria Imperio, ne al Italio kiel hodiaŭ. Li doktoriĝis pri juro en Vieno, kie li havis okazon perfektigi ankaŭ pri matematiko, fiziko kaj astronomio. En tiu epoko estis aperantaj la unuaj modernaj internaciaj lingvosistemoj, kiel Volapük: tiu problemoj tuj interesis lin, sed nur pli poste la studado de Esperanto konvinkis lin pri efektiva vivebleco de artefarita lingvo. Tiel naskiĝis en li la ideo traduki en tiun ĉi lingvon la *Dian Komedion*, kies legado iĝis por li pasio ekde knaba aĝo.

Li eniris la ŝtatan administracion kiel sekretario de la Konsilantaro, kaj li ĝin forlasis en 1891, kiam oni nomis lin direktoro de Magistrato de la urbo Trento. Ĝuste en tiu periodo li komencis sian laboron: unua provo, steno-
grafia, de la traduko estis preta en 1914. Kiam la milito kun Italio komen-
ciĝis, en majo 1915, la Trentaj gravuloj dividis inter si la taskon: dum kelkaj
elmigris al Italio, li, kiu intertempe estis elektita kiel deputito, kaj aliaj restis
en Trento, interkonsente ankaŭ kun Cesare Battisti, por defendi la rajtojn
de la samcivitanoj. Sed Giovanni Peterlongo estis en la listo de la *irredendis-
ti* (nomo donita al tiuj, kiuj deziris aliĝon de Trento kaj aliaj urboj al Italio),
kaj eĉ de la suspektatoj pri alta perfido, pro siaj sentoj favoraj al Italio. Ma-
nuskriftoj, libroj, revuoj, kaj eĉ tiu unua tradukprovo estis sekestritaj, dum
li estis forsendita al deviga loĝado en Linz, en supra Aŭstrio. Tie li eltenis du
procesojn, en 1916 kaj en 1917, sub akuzo pri *irredentismo* kaj alta perfido.
Male de Cesare Battisti, lia kara amiko kaj *irredentista*, kiu estis pendumita
de la aŭstria registaro en 1916 pro ŝtatperfido, la estonta tradukisto
havis pli da bonŝanco: la nova Aŭstria imperiestro, Karlo, postsekvinta

Franciskon Jozefon, konsentis amnestion. Kiam lia amata urbo estis liberigita, li estis nomita unue civila komisaro ĉe la milita registaro en alto Adige, kaj poste vicguberniestro de la regiono. En majo de 1922, liaj samurbanoj nomumis lin unua urbestro de Trento italigita. Post kvar jaroj, ĉagrenita kaj sen-iluziigita de la politikaj intrigoj de tiu periodo (la faŝisma registaro gajnis la voĉdonadojn en la sama jaro, kaj Benito Mussolini estis nomumita «duce» de Italio), li forlasis definitive sian longan, senmakulan agadon, sin dediĉante komplete al la publika bono. La 9an de januaro 1941 li mortis kristane en Milano, havante ĉirkaŭ si siajn familianojn, trankvila kaj serena en la konscio pri plenumitaj devoj.



Memorplato al la fama tradukisto, kroĉita en Trento, en la Peterlongostrato, okaze de la 44-a itala kongreso de esperanto en 1973

La traduko

Sendube, la unua ideo traduki la ĉefverkon de la itala literaturo venis al juna Giovanni dum la oficiala inaŭguro de la bronzmonumento al la mezepoka poeto, kiu solene okazis en Trento en 1896. Li, inter aliaj, faris prelegon tiukaze: dum tiu okazaĵo la urbo Trento fieris pri ĝia itala lingvo kaj kulturo. Sed kial, iu povus demandi, la *Dia Komedio* en Esperanto? Dante mem diris, ke ekzistas riĉaĵoj je kiuj ni estas des pli riĉaj, ju pli ni disponigas ilin al la aliaj. Dante estas universala poeto: lia profunda homaraneco

penetru do en la malproksimajn landojn nordajn, orientajn, kaj brilu ankaŭ per tiu ĉi lingvo ĉie, kie ĝi estas konata, je pli granda gloro lia kaj de Italio. Tiel pensadis Giovanni Peterlongo kiam li volis starigi, per pacienca laboro, sian monumenton idealan al «patro Dante», de kies poemo li eltiris tiom da konsolo en la malĝojaj horoj de l' ekzilo kaj, pli poste, en tiuj amaraj de la politika vivo. Monumenton, kiun li en sia penso metis apude al tiu el bronzo, kiun li estis oficiale akceptinta, en la malproksima jaro 1896, kiel kanceliero de sia urbo, de la manoj de samcivitaj patriotaj amikoj siaj.

Laŭ la fama esperantisto Gaston Waringhien, kiu verkis antaŭparolon okaze de la unua eldono de la traduko, en 1963 (do, pli ol dudek jarojn post la forpaso de la tradukisto), Giovanni Peterlongo, por traduki la monumentan poemon (dek kvar mil trioje rimitaj versoj!) elektis ne nur «strikte kaj fidele redoni la enhavon dank' al foroferado de la rimoj, sed ankaŭ trudi al si la neceson savi la koncizon kaj densecon de la formo per la konservado de la ritmo». Jen ekzemplo de la famaj unuaj du verstripoj de la *Dia komedio* (*Infero*, I, 1-6):

<p>Nel mezzo del cammin di nostra vita Mi ritrovai per una selva oscura, ché la diritta via era smarrita. Ah quanto a dir qual era è cosa dura Esta selva selvaggia e aspra e forte Che nel pensier rinnova la paura!</p>	<p>En mezo de l' vojaĝ' de nia vivo En arbareg' malluma mi troviĝis, ĉar mi de l' rekta vojo forvojiĝis. Ha kiom pezas diri kia estis Tiu arbar' sovaĝa, kruda, densa, Kiu eĉ pense renovigas timon!</p>
--	---

La ilustrita eldono

Kiam en 1963, finfine, oni eldonis la tutan tradukon, ĝi estis akompanata per mirindaj desegnoj de la fama pentristo de la Renesanco, Sandro Botticelli. Oni scias ke li ofte legadis kaj parkere deklamis plurajn versojn de la ĉefverko, kaj intencis fari entute cent ilustraĵojn por enmeti ilin en eldonaĵon, sed finfine li malfruis en sia laboro, kaj la poemo estis eldonita sen liaj ilustraĵoj. Poste, la desegnoj malaperis dum pluraj jarcentoj. Nur en pasinta jarcento oni retrovis kaj eldonis kelkajn el ili, sed

ĝis la esperanta eldono, neniam ili estis komplete eldonitaj. La filo de la tradukisto, s-ro Paolo Peterlongo, inĝeniero kaj grava kolektanto kaj mecenato, havis la ideon kaj la eblecon kolekti la tutan serion de la desegnoj de la fama pentristo por enmeti ilin okaze de la eldono de la esperanta traduko de sia patro, por honori lin. Tiumaniere, ĉiu kanto de la poemo (cent kantoj entute) estas akompanata de mirinda ilustraĵo de la fama pentristo.



Il pozzo di Cocito. I Giganti Nembrot, Fialte ed Anteo (Inferno, canto XXXI)

Io senti' sonare un alto corno
 Non sonò sì terribilmente Orlando
 Sappi che non son torri, ma giganti,
 fuggiemi errorie e cresciemi paura
 "Fatti qua, sì ch'io ti prenda"
 Poi fece sì ch'un fascio era elli e io.

La puto de Koĉito. La gigantoj Nemrod, Fialte kaj Anteo (Infero, kanto XXXI)

Sed aŭdis tiel laŭte soni kornon,
 Tiel terure graf' Roland' ne blovis.
 Sciu: ne estas turoj, sed gigantoj,
 mi pli seneriĝis, sed pli timis,
 «Aliĝu, por ke mi vin prenu».
 Poste el si kaj mi li faris faskon.

Elvezio

LA KOMPANOJ EN PARTHENAY

Esperanto 79 organizas kvartagan staĝon dum la Ĉielira* semajnfino, t.e. de ĵaŭdo, la 25a ĝis dimanĉo la 28a de majo 2017, en **Le Retail, Parthenay kaj Secondigny (79)**


- Ni kunkantos en esperanto kun **La Kompanoj** kaj kun loka koruso.
 - Ni malkovros tiun legendan regionon okaze de diversaj promenoj kaj vizitoj.
 - Samtempe okazos inicado al la lingvo Esperanto por komencantoj.
- Malkovru la kompletan programon de la staĝo je <http://lakompanoj.free.fr/>

Por rezervi, bonvolu elŝuti, plenigi kaj sendi la elŝuteblan aliĝilon, **nepre antaŭ la 24a de aprilo 2017**, al:

Gilles DELORME-GUILLON, 10 rue Pasteur, 79200 PARTHENAY

aŭ rete al gilles-delorme@laposte.net aŭ al Esperanto79.asso@gmail.com

(* ankaŭ serĉe kromnomata *Liftotago*)



GRATULOJN!

LEGI ĝojas anonci la geedziĝon de JeanSeb kaj Annie, la 6an de januaro, en Pesako. Elvezio estis la atestanto de JeanSeb.



Elvezio, JeanSeb, Annie kaj France, atestantino de Annie



KURKUMO

Kurkumo estas staŭdo devena de Suda Azio. La kvalitoj de ĝia rizomo estas tiel universale agnoskitaj, ke ĝi estas surmerkatigata en la tuta mondo.

Sekigita kaj pulvorigita rizomo de kurkumo utilis longatempe kiel kolorilo pro sia rimarkinda flavo.

En Barato, Ĉinio, Japanio, Tajlando, Indonezio, medicino uzas ĝin por stimuli digestadon, aparte ĉar ĝi pliigas galan sekrecion. Tial ĝi almiksiĝas en spicaĵo entenata en orientaj pladoj, kareo, spicomiksaĵo ĉie-esta en la barata kuirarto.

Ĉar mi ja spertis ilin, mi prezentas al vi la bonefikojn de kurkumo. Ĝi entenas tre potencajn kontraŭoksidantojn (i.a. kurkuminon), tial la uzado de tiu planto por flegi diversajn inflamajn perturbojn, kiaj reŭmatismaj kaj menstruaj doloroj. Post unumonata flegado (po ses kapsuloj tage dum unu monato) la artrozaj doloroj duoniĝas. Ĝi ankaŭ estis sukcese provita ĉe homoj suferantaj inflamajn malsanojn de intestoj, kia kojlitio. Delonge ĝi estas uzata por lukti kontraŭ 1-tipa diabeto.

Ĝiaj preventaj kapabloj efikus ankaŭ kontraŭ pluraj kancerroj, i.a. kontraŭ tiuj de ORL, de pulmo kaj de mamo. Ĝi ankaŭ laŭaserte bonefikus por redukto de intraepitelia neoplazio, prekancera stato de prostato.

Tamen atentu se vi suferas galajn obstrukcojn aŭ konkrementojn, prefere konsultu kuraciston. Ĉiel, oni konas neniun misefikon je kutime uzataj dozaj.

Morine

Traduko: grupo de Cenon



Kurkumo : de staŭdo al spico



PIRENEA ESPERANTISTA KORUSO EN ARIEGE

De la 11a ĝis la 18a de februaro 2017

Por la tria fojo mi partoprenis en la Pirenea Esperantista Koruso organizita de la CEEA (Centre d'Études Espérantistes de l'Ariège) sub la gvidado de ties prezidanto Georges Comte (Jorgos).

Tiu 24a staĝo en La Bastide sur l'Hers, ĉarma vilaĝo laŭ la rivero Hers, venigis pli ol 25 korusanojn de diversaj regionoj el Francio, Anglio, Nederlando.

Nia korestrino, Rineke Hoens, nederlandanino, venis en Francion por la unua fojo. Ŝi antaŭe kantis en la grupo Akordo en sia lando, grupo kiu nun ne plu ekzistas, sed tamen registris plurajn KD-ojn.



Rineke ĉiam montriĝis afabla, ride-ma, pacienca, kaj tre kompetenta konsiderante la rezultojn. Ŝi komencis la provludojn ĝustatempe je la 9a kaj je la 17a, domaĝe por la malfruantoj! Ŝi neniam montris al ni sian malplezurigon pro la malfrua alveno de sia valizo perdita en la flughaveno, kiu alvenis nur la merkredon post multaj telefonalkvokoj...

Rineke rete sendis al ni pli ol tridek printeblajn partiturojn, kaj vidante la nombron de la kantoj, kiujn ni devis lerni, mi iomete timis... Finfine ni bone studis 14 kantojn, kiujn ni prezentis fine de la semajno en koncertoj, la unua en la maljunulejo de la vilaĝo kiu akceptis nin, kaj la dua en alia vilaĝo, Verniolle, post konferenco de juna brazila studento Guilherme Fians pri sia lando. Bedaŭrinde tiu konferenco, tre interesa, tre bele prezentita, estis mallongigita pro manko da tempo.



Sekvis brazila kaj agrabla kantisto kun sia gitaro. Ankaŭ li bedaŭris ne povi doni ĉion, kion li esperis, ankaŭ pro manko da tempo.

Post brazila aperitivo ni kune manĝis, modere, ĉar tuj poste ni donis nian duan koncerton antaŭ loka (sed ne tro multnombra) publiko.

Poste ni ĝoje aŭskultis «Lo Cor de Cantarata» okcitana koruso, kiu gaje kantis kaj dancigis nin.

Estis tre riĉa semajnfina programo post tiu densa laborsemajno. Efektive ni provkantis po 3 horojn matene, kaj po 2 horojn posttagmeze, post libera tempo, kiu ebligis al ni ĉu ripozi, ĉu ludi, ĉu promeni, ĉu turismumi. Ĉar la vetero estis bela, bluĉiela kun neĝo brilanta sur la pintoj de la montaro, mi profitis kun aliaj de tiu libereco por aerumi min en la naturo.

Kelkaj vizitis la kastelon en Foix, la ruinojn de la katarista kastelo Montségur, ĉeestis en opero «Cosi Fan Tutte», rekte transsendita de Palaco Garnier en Parizo ĝis kinejo en Lavelanet!

Kun Lucia kaj Janet ni foriris sabaton matene, sed la aliaj restis por denove kanti sabaton vespere.

Bela kaj riĉoplena korusa staĝo, en kiu mi partoprenis kun granda plezuro.



Monique





Kiel la korvo Tieceło forprenis fromaĝon de maljunulino kaj kiel Renardo forprenis ĝin de Tieceło.

T iuj vortoj estis por Tieceło tre mildaj, ĉar li pretendis esti la plej agrabla kantisto en la mondo. Do, li tuj malfermas la bekon kaj laŭtigas longan krion.

- Ĉu bele, tiel, mastro Renardo?

- Jes, diras li, ne malbele; sed se vi volus, vi pli alte kantus.

- Do, aŭskultu min.

Li tiam pene streĉas la gorĝon.

- Via voĉo estas bela, diras Renardo, sed ĝi estus multe pli bela se vi ne manĝus tiom da nuksoj. Tamen, daŭrigu, mi petas.

La alia, kiu nepre volas gajni kantopremion, tiel malatentigas ke, por pli bone eligi la sonon, li iom post iom malfermas la ungojn kaj fingrojn kiuj stringis la fromaĝon, kaj lasas fali ĝin ĝuste ĉe la piedojn de Renardo. La glutemulo tiam tremetas pro plezuro; sed li sin retenas, esperante kapti, krom la fromaĝon, ankaŭ la vantanojn.

- Aj, Dio, li diras ŝajnigante peni por stariĝi, kiom da suferoj la Sinjoro sendis al mi en ĉi tiu mondo. Nun mi ne plu povas formoviĝi, ĉar mia genuo tro doloras min; kaj tiu ĵus falinta fromaĝo haladzas fetoran kaj neelteneblan odoron. Nenio pli danĝeras ol tiu odoro por krurovundo; la kuracistoj zorge avertis min, rekomendante neniam gustumi eĉ peceton. Malsuprenflugu, mi petas, mia kara Tieceło, venu forigi de mi tiun abomenaĵon. Mi ne petus de vi tiun serveton se antaŭ nelonge mi ne rompus la kruron en malbena kaptilo, streĉita kelkapaŝe de ĉi tie. Mi estas kondamnita restadi tiuloke ĝis efika plastro ekebligas mian resanigon.

Kiel malfidi tiajn vortojn akompanatajn de ĉiaj doloraj grimacoj? Cetere, Tieceło emis favori tiun, kiu ĵus agnoskis la ĉarmon de lia voĉo. Do li malsuprenflugis de la arbo; sed tuj post lia surteriĝo la apudeco de Renardo pripensis lin. Li aliris paŝon post paŝo, kun gvata okulo, kaj sin trenante sur la postaĵo.

- Dio mia, diris Renardo. Hastu do, antaŭen, kion vi povas timi de mi, kompatinda kriplulo?

Tiecelo alpaŝis pli, sed Renardo, tro malpacienca, impetas kaj maltrafas lin, gajnante nur tri aŭ kvar plumojn.

- Ha, perfida Renardo! tiam diras Tiecele. Mi ja devus scii, ke vi trompos min. Mi pagas per kvar el miaj plej belaj plumoj, sed nur tion vi havos, malica kaj furza latrono. Dio malbenu vin!


Renardo iom konfuzita volis pravigi sin. Pro atako de podagro li kontraŭvole eksaltis. Tiecele ne aŭskultis lin:

- Konservu la fromaĝon, ĝin mi forlasas al vi; koncerne mian korpon, vi ne havos ĝin. Nun ploru kaj ĝemu laŭplaĉe, mi ne venos por helpi vin.

- Nu, forflugu, misaŭgura kriaĉulo, diris Renardo, rekonformiĝante al sia naturo, tio konsolos min kompense pro mia malsukceso ŝlosi vian bekon. Je dio, li pludiris, jen vere bonega fromaĝo; mi neniam manĝis pli bongustan; ja ĝuste taŭga kuracilo kontraŭ mia krumalsano.

Kaj elmanĝinte li lerte revojiris al la arbaro.

FINO de la kvara aventuro de Renardo



Desegnis Morin'



ESTRARO
de
« ESPÉRANTO-GIRONDE »

* * * * *

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON
Banque Postale:
347771 F Bordeaux



* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Rés. Du Prince Noir Bât.D Appt.315
Avenue Sainte-Marie
33400 TALENCE
Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**
2, chemin des Nauves
Chardes 17130 MONTENDRE
Tel: 05 46 49 45 18 / janinedum@neuf.fr

Kasistino: **Morine STRIDE**
17 rue Voltaire
33670 CREON
Tel : 06 10 07 08 58 / morinestride@gmail.com

* * * * *

Materialon por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al Yannick DUMOULIN: yannickdum@free.fr

